Balazs Wacha,

# Rokkanto

Prometeo, Promete',
ĉar vi estis sola,
Prometeo, Promete',
dum promen' konsola -
homojn skulptis vi.

Prometeo, Promete',
homojn ĉi multetajn,
Prometeo, Promete',
homojn, la stultetajn
ja instruis vi.

Prometeo sur la ter'
homojn instruadis,
plugis, bakis brikojn kaj
ankaŭ konstruadis,
dio Promete'.

Prometeo, Promete',
ĉar vi fajron ŝtelis,
Prometeo, Promete',
Zeŭso vin forpelis,
ĉenis vin al rok'.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Balazs Wacha *(Blazio).*

*Arg-351-697 (2006-02-23 10:44:58)*